

STARTO

N-ro 1/2012 (242)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Marcipana dimanĉo en Esperanto-muzeo

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, vl.dv@centrum.cz, 774 999 091 (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj krom UEA, EEU)

Vicprezidantino (komitatano A de UEA): Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (UEA, EEU, membroj, sekcioj, kluboj, konferencoj, protokolado)

Vicprezidantino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257, dvor.libuse@seznam.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Kasisto: Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz (membrodatumbazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.esperanto@gmail.com (informado, retaj projektoj, ekspozicioj, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec@volny.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, miropiro2312@gmail.com (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

Revizia komisiono de ĈEA:

Prezidanto: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge, la komitato.

Alparolo de nia prezidanto

Karaj kaj estimataj ĈEA-membroj,

komence de kun antaŭtimo atendata jaro 2012 kaj samtempe mia unua jaro kiel ĈEA-prezidanto permesu al mi esprimi mian tute personan starpunkton.

Por ĉiuj klaras, ke tiu ĉi jaro ne apartenos al facilaj – minacas multo ekde ekonomia krizo kun neceso ŝpari ĝis prognozoj pri la sorto de la mondo. Mi tamen deziras, ke vi kaj viaj proksimuloj ne nur ĉion sukcese transvivu, sed ankaŭ prenu iun instruon por utiligi dum venontaj jaroj. Mi ne dubas, ke por kelkaj eĉ la jaro 2012 fariĝos simple perfekta, ĉar ni ĉiuj vivas nian individuan sorton kaj iu ajn povas ĝuste nun ion imponan, ĝojigan kaj neimageblan trapasi.

Mi senvuale konfesas, ke nuntempe videbliĝas precipe individuemuloj kaj malaperas inklino al komuna laboro kaj celado. Kial do esti membro en iu asocio? Kion en Esperanta medio oni ne povas konsumi solaj? Kio estas via persona motivo? Kial ni (en sfero de Esperanto kaj asocio) ne progresas?

Estas multaj demandoj, al kiuj mi strebas trovi respondojn kaj adekvate reagi. Ja la angla ĉie superas kaj ni pliaĝiĝas kaj novuloj malmultas kaj tempo ĉie mankas. Tamen ĉu kaŭzis ĉion vere nur objektivaj kialoj? Ĉu ni mem ne kulpas same? Mi konfesas, ke mi kiel ĈEA-membro en lastaj jaroj iom helpis al mia edzino Pavla pri ŝiaj



poresperantaj aktivecoj, sed mem iniciatis preskaŭ nenion, nek engaĝiĝis en aliaj kampoj. Ne estas surprize, ke kvankam en la asocio mi jam membras pli ol 25 jarojn, sendube mi multajn membrojn ne konas, eĉ foje tiujn, kiuj relative regule aranĝojn vizitadis, ĉar ... ja mi mankis. Des pli probleme estas nun por mi fari propagandon kaj venigivan aktivadon. Bedaŭrinde alia ebleco laŭ mi ne ekzistas.

Antaŭ 20 jaroj mi jam estis ĈEA-vicprezidanto por 3 jaroj. Tiam la asocio havis ĉirkaŭ 3.000 membrojn kaj laŭ fingroj nekalkuleblan nombron de aktivaj kluboj kaj sekcioj, kiuj memstare okazigis siajn aranĝojn kaj programojn. Fine de la okdekaj jaroj nur la junulara sekcio havis kompareble samkvantan membraron kiom nun estas nombro de pagantaj ĈEA-anoj por Starto!

Kien ili perdiĝis? Ja mi konsentas, ke epoko ŝanĝiĝis kaj la angla regas ktp ... Mia propra diverskiala pasiveco ankaŭ respondas. Ĝisvivintoj tamen pripensu, kion vi atendas de la asocio kaj kial vi estas en ĝi? Io ja devas ekzisti ... do disvolvitu tion!

Sendube ĉie oni bezonas kaj pasivajn membrojn, kiuj pagas siajn kotizojn, partoprenas la aranĝojn aŭ simple nur subtenas ideojn. Ilia stato rezultas el plej diversaj cirkonstancoj kaj mi neniom aŭdacas kritiki ilin – mi ja apartenis dum multaj jaroj al ili kaj ne dubas, ke post iu periodo denove apartenos. Tutklare mi ripetas, ke ĉiu organizo bezonas ilin kaj mi dankas por

tiuj, sed ankaŭ necesas sufiĉe da agemaj kaj aktivaj, kies proponoj poste realiĝas kaj kiuj plu puŝas la organizon. ĈEA havas sian nepran lokon surmape kiel ĉenero de monda esperantistaro. Sed kiom vere ĝi helpas al progreso?

Mi nur nun kiel prezidanto devis pli profunde enmergiĝi kaj trovis multon malĝojigan – pli kaj pli malpliigantan membraron, budĝetajn deficitojn aŭ juran ĥaoson. Aperis problemoj, kiujn mi ne antaŭvidis kaj multflanke la situacio estas kriza. Neniukaze mi kulpigas antaŭajn komitatojn – ili ja faris ĉion volontule en sia propra libertempo. Ĉiu komitanano en la lastaj 20 jaroj apartenis al aktiva kerno, kiu strebis laŭ siaj eblecoj kaj faris ... pli ol mi kaj 90% de ĈEA-anoj.

Nun ni frontas diversajn obstaklojn kaj multo devas solviĝi. Eĉ malpli granda grupo foje estas avantaĝo, ĉar ja oni pli bone konas unu la alian kaj scias, kiu kion povas fari. Tamen necesas dediĉi iom da tempo – esti pli aktivaj aŭ pretaj helpi kaj ĉefe trovi indajn rimedojn kaj celojn, kiuj povos nin unuigi kaj montri, ke io utila postrestas. Mi denove tre dankas al ĉiuj, kiuj eĉ pasivaj almenaŭ pagas siajn kotizojn kaj foje partoprenas la aranĝojn, sed mi opinias nepra trovi komunajn celojn, projektojn kaj laborojn, kiuj estos interesaj por la proponotaj grupetoj. Sen esprimiĝi kaj malfermiĝi al publiko ĈEA miaopinie ja ankoraŭ kelkajn jar(dek)ojn funkcios kun kutima ĉiujara konferenco/kongreso kaj Starto, sed iom post iom kiel dum pasintaj jaroj direktiĝos al pereco.

Mi forte petas vin trovi vian kampon por pli aktive montriĝi – ĉu propagan-

di, ĉu instrui, ĉu organizi aranĝojn, ĉu traduki aŭ verki, ĉu prezenti viajn ideojn aŭ krei proprajn komisionojn. Same du komitataninoj Pavla Dvořáková kaj Libuše Hýblová, kiuj ĉefe zorgos pri planoj de farenadoj (krom la E-muzeo), proponos en venonta numero ideojn kaj projektojn, al kiuj ili invitos vin. Estu pli aŭskultantaj, pretaj kaj agemaj ol estus mi antaŭ kelkaj jaroj.

Nia organizo frontas krizon kaj sen trovi komunajn agadkampojn, prezenti aktivecon kaj senti kunecon ĈEA perdos sian utilon. Kritiku (nin), kontraŭstaru, sed aktivu laŭ viaj ebloj kaj kapabloj! En la jaro 2012 enkadre de ĈEA oni sentos nur etajn ŝanĝojn, sed ni ĉiuj semu, por ke la aŭtuna konferenco klare decidu pri plua aktivado kaj irotaj direktoj. Ĉiu estrarano volonte reagos al viaj sugestoj aŭ planoj.

Pardonu foje troan kritikemon. Estas mia stilo, sed ĉi-tempe mi konsideras ĝin vere necesa. Apliko de nia devizo „ĈEA ne estas komitato“ dependas de ni ĉiuj. Bv. ne krei barojn inter ni – ni en la komitato pretas interparoli, propravole akceptis funkciojn por ion solvi kaj helpi, sed sen trovi kunlaborantojn ni neniom sukcesos. Restos maksimume surpaperaj ideoj. Tra tiaj okuloj do bv. taksi niajn leterojn aŭ projektojn, kiujn vi legos. Ni komune serĉu respondojn al solvendaj taskoj kaj problemoj kaj progresigu poresperantan agadon.

Sukcesan jaron kaj iniciatemon sur poresperanta kampo deziras

Vladimír Dvořák

Marcipana dimanĉo

En la dua adventa dimanĉo la 4-an de decembro 2011 Esperanto-muzeo en Svitavy denove pleniĝis de infanoj, kiuj ne povis ĝispacienci modladon per marcipano. La geedzoj Vyšinka el Vracov jam la kvaran fojon venis al Svitavy kun marcipanaĵaj figuretoj kaj porciumitaj pastopecoj por modlado.



Ĉi-foje la infanoj inklinis pli multe al Kristnaskaj temoj. Kreataj estis anĝeloj, diabloj, fiŝetoj, porkidoj, neĝuloj, sed ankaŭ delfenoj, pingvenoj, paĉjo Smurf (Ŝmoula), kokcinoj sur folio, musoj kun fromaĝo. Modlis infanoj trijaraj, sed aperis ankaŭ modlantoj dudekjaraj. Ankaŭ paĉjoj helpis aŭ konsilis. Kiel ĉiam ĉiu kreanto forportis hejmen memordiplomon. Siajn impresojn la vizitantoj konfidis al redaktorino de Radio Pardubice, s-ino Pavlasová, kiu venis inter nin. La figuretoj de Anna

Vyšinková estis donacitaj al infanĝardeno en Moravská Chrastová. Cent tridek infanoj kreis 380 figuretojn.

Sankt-Jakoba pilgrimo

Dimanĉe la 11-an de decembro 2011 venis al Esperanto-muzeo en Svitavy praga esperantisto Stanislav Krajíček rakonti pri sia tricentkilometra pilgrimo



el León al Santiago de Compostela en Hispanio. Pri la prelego interesiĝis aŭskultantoj de loka publiko. Multaj vizitis la muzeon unuafoje. La rakontado kun lumbildoj tre plaĉis, la fina kvizo testis la atentemon de la aŭskultantoj. Ankaŭ poste ili ankoraŭ diskutis pri la malfacilaĵoj kaj suferoj de la longa vojaĝo.



Libuše Dvořáková

Esperanta Silvestro en Česká Třebová

La 29-an de decembro esperantistoj festis jarfinon en Česká Třebová. Alveturis 61 esperantistoj el 16 lokoj de la respubliko. Inter la partoprenantoj estis jam tradicie unu esperantistino el Neder-



lando.

La organizantoj preparis buntan programon. Ili gratulis al Liduš kaj Boženka Jílek kaj al Karel Vala okaze de iliaj jubileoj, kiujn ili festis jam ene de la jaro. Rekompencita estis loka esperantisto Ing. Ladislav Kovář, ĉefa organizanto de internacia kongreso de esperantistoj-fervojistoj, kiu okazis en Liberec. Interesa estis kvizo, kiu konsistis el demandoj pri la socia vivo kaj pri geografiaj scioj. Ĉu vi scias ekzemple, kie oni parolas mandarene, kiel oni nomas hungare Ludovikon aŭ kiel

precize aspektas burĥo? Tamen la ĉefa konkursa temo estis teatraĵoj inspiritaj de „Malnovaj mitoj ĉeĥaj“. Al la konkurso aliĝis 12 spektakloj. La historion multaj konceptis siamaniere. La Esperanto-rondeton de Polička reprezentis geedzoj Jílek el Sebranice kaj Lezník kaj akiris trian premion por la sceno „Oldřich kaj Božena“. La duan premion atingis por Česká Třebová loka esperantistino pro oratora prezento de princino „Libuša“. La unuan premion forportis la klubo el Pardubice, kiu kune kun Karel Vala el Šumperk aktoriz „Pri Bivoj“. La tasko de ĵurianoj ne estis facila, ĉar la aktoraĵoj estis preskaŭ samkvalitaj. Ĉiuj aktorantoj meritas grandan admiron. La kulmino de la vespero estis kiel ĉiam tosto renkonte al nova jaro kaj disdonado de donacoj. Jam nun la organizantoj cerbumas, kian temon elekti venontfoje.

Libuše Dvořáková



Esperanto-Muzeo en televido

Dum Vikimanio en Svitavy, pri kiu ni jam informis en la pasinta Starto, venis ankaŭ televido de Hradec Králové kaj registris kurtan filmon pri nia muzeo. La filmon elsendis televido Prima kaj nun ĝi aperis en la interreto ĉe jena adreso:



www.youtube.com/watch?=skijrj43SXo

En la filmeto aperas pluraj vizitantoj de la muzeo, kelkaj intervjuataj esperantistoj, kantanta Miroslav Smyčka, panejoj kaj ŝrankoj kun muzeaj eksponaĵoj kaj libroj.

Esperanto en Radio Brno

La 23-an de januaro 2012 Radio Brno elsendis en programo *Apetyt* interparolon kun Josef Vojáček je la temo Interhoma komunikado ... kaj eble eĉ per Esperanto. Vi trovos ĝin je la adreso:

<http://prehravac.rozhlas.cz/audio/2539703>

Josef Vojáček sukcesis ankaŭ renovigi kursojn de Esperanto en Filozofia fakultato de Masaryk-universitato ĉe la Instituto de lingvistiko kaj baltistiko, jam aliĝis 69 studentoj.

Zamenhof-festo en Vieno

La 10-an de decembro 2011 okazis en pola instituto en Vieno malgranda Zamenhof-festo, kiu omaĝis al Baghy kaj Kalocsay, kiuj naskiĝis antaŭ 120 jaroj (prelegis Katalin Fetes). Poste Katarína Nosková prezentis laboron kaj novajn projektojn de la teamo E@I.



Ĉeĥaj kaj slovakaj partoprenantoj sur komuna foto de Julia Schlapsi.

Nova filmo pri Esperanto

<http://esperantodocumentary.com/eo/about-the-film> Ĉe tiu ĉi adreso vi povas spekti filmon *The Universal Language* de Oskar-premio-nomumita dokument-filmisto Sam Green. En la filmo aperas famaj esperantistoj (H. Tonkin, M. Fettes, A. Wandel, P. Baláž k.a.).

La projekto de reta PIV ne haltis

En marto 2011 estis finkolektita la postulata sumo de 10 mil eŭroj, por ke PIV povu aperi en la reto. Nun volontuloj tralegas la ciferecigitan version klopodante elsarki mistajpojn.

laŭ Libera Folio

Projekto 125

La 26-an de julio 2012 Esperanto fariĝos 125-jara. Dum ĉi tiu periodo, relative longa kompare al homa vivdaŭro, sed negranda por vivo de lingvo, ĝi disvastiĝis de nulo en ĉiujn kontinentojn dank' al nelacigebla laboro de multaj volontuloj. Tamen tio estas tro malmulte por oficiala akcepto de Esperanto kiel universala komunikilo. Tion kulpas la fakto, ke (diference de naciaj lingvoj) malantaŭ ĝi ne staras politika kaj ekonomia povo. Estas grave ne preterpasi la jubileon, sed uzi ĝin kiel ĝustan tempon por agi.

Malgraŭ tio, ke Esperanto estas eĉ dekoble pli rapide lernebla ol aliaj fremdaj lingvoj, sen lernado ne eblas ĝin ekposedi. Kaj sen instruado kaj lernado ne eblas pligrandigi la nombron de lingvo-parolantoj. Tio signifas, ke por preparo kaj realigo de lingvaj kursoj necesas kaj instruistoj, kaj lernantoj aŭ studentoj. Se en via rondeto aŭ klubo estas instruisto(j), estas bone, se ne, verŝajne vi trovos inter viaj membroj iu(j)n, kiuj volus instrui, sed bezonas akiri spertojn por tio. Ekzistas diversaj eblecoj: Kursoj diversspecaj por instruistoj estas organizataj en Herzberg am Harz — la Esperanto-urbo en Germanio, informoj estas atingeblaj sur la TTT-paĝoj <http://esperanto-urbo.de/>. Kiam iu volas lerni en komforto de sia hejmo per interreto, tiu povas aliĝi al RITE-kurso — Reta Instruista Trejnado en Edukado.net. La kursoj ne estas senpagaj, sed eblas ricevi stipendion, informoj troviĝas ankaŭ sur la koncernaj paĝoj. Fakan trejnadon

de instruistoj ofertas ankoraŭ universitato de Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando. Ankaŭ pli spertaj instruistoj povas pliperfektigi per plua studado por altigi nivelon de siaj kursoj, aŭ povas uzi diversajn ekzercojn kaj metodikajn konsilojn el Edukado.net.

Kaj kiamaniere akiri lernantojn? Necesas informi pri Esperanto kaj kurso en amaskomunikiloj, persone interkonatoj aŭ dum diversaj okazaĵoj. Vi certe ricevos ofte respondon: Mi aŭ miaj infanoj prefere lernos la anglan. Tiam eblas rememorigi propedeŭtikan valoron de Esperanto kaj ĝian pruvon per sciencaj eksperimentoj. Ne necesas paroli rekte pri propedeŭtiko, ĉar iuj ne komprenos ĉi tiun fremdan vorton. Indas klarigi, ke lernado de Esperanto estas preparo por lernado de plua(j) fremda(j) lingvo(j), simple lingvolanĉilo. Kiu asertos, ke li ne havas tempon por vizitadi la kurson, al tiu vi povas rekomendi lernadon pere de interreto, sur paĝaro lenu.net estas diversnivelaĵoj kursoj. Ankaŭ ILEI preparas 125-eran retan kurson, kiu estas plenumbla tra la 125 tagoj antaŭ la jubileo, de inter la 23-a de marto kaj la 26-a de julio.

Por peri informojn inter la nacia kaj internacia niveloj ILEI petis nomumi reprezentantojn en unuopaj landoj. Agadterenoj inkluzivas kontaktadon kun ĵurnalistoj, starigon de reklamkampanjoj kaj trarigardon de lernado en kursoj kaj per interreto. Pri la unua parto respondecas Pavla Dvořáková — pavla.esperanto@gmail.com, pri la dua Josef Vojáček — jvojesp@gmail.com. Ni petas vin sendi al ni la koncernajn informojn, por ke ni povu informi la estraron de ILEI.

En informado pri Esperanto eblas uzi ankoraŭ pluan jubileon — la centjaran datrevenon de naskiĝo de Tibor Sekejl. Informojn pri li vi povas trovi en Pan-teono de Edukado.net.

Ni esperas, ke poresperanta laboro ĉe ni vigliĝos kaj ke ĝi alportos bonajn rezultojn.

Josef Vojáček

Rimarkigo: Ekzistas ankaŭ lernolibroj pri amatora instruado de Esperanto, ekz. Rudolf Rakuša: *Metodiko de la esperanto-instruado* kaj Irena Szanser: *Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado*

Kongreso de AEH-IKEH

Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj kun sia Internacia klubo en Pardubice invitas vin por partopreni la 6-an Internacian kongreson de AEH-IKEH. Ĝi okazos en la somerrestadejo Štíří Důl en Hluboká ĉe Krucemburk en la tagoj de 13. - 16. 9. 2012.

Štíří Důl - (en E-traduko Skorpia valo) estas natura rezervejo troviĝanta inter la urbeto Krucemburk kaj vilaĝo Hluboká kaj nur 10 minutojn piede de 60-hektara granda refreŝiga fiŝlago Řeka (Rivero) en bela valo. La antikva urbeto Krucemburk troviĝas en la regiono Ĉeskomoravská vysočina (Bohemia-Moravia Montetaro), kie vivis kaj kreis multaj elstaraj personoj, skulptistoj ktp.

La kongreson povas partopreni ankaŭ aliaj esperantistoj, nemembroj de la asocio AEH, kiuj volas travivi kun ni momentojn en agrabla medio de bela naturo.

La aliĝiloj estos almetitaj al la marta numero de AEH-Infomilo.

Pliaj informoj ĉe aeh-ikeh@volny.cz.

UPOZORNĚNÍ PRO VŠECHNY ODBĚRATELE STARTA

Děkuji všem, kteří již uhradili svůj členský příspěvek pro rok 2012. Zároveň však ostatní upozorňuji, že dále není možné jako v minulých letech Starto posílat celý rok i členům, kteří svůj roční příspěvek ještě nezaplatili, protože to příliš zatěžuje roční rozpočet.

Prosím proto všechny, aby svůj příspěvek uhradili nejpozději do 15.5.2012, protože v opačném případě nemůžeme garantovat, že dostanete další čísla Starta. Věřím, že situaci chápete a že úhradu příspěvku nenecháte až na závěr roku. Jen platící člen má také právo čerpat slevu na společnou konferenci tří zemí v září 2012 v Břeclavi a na další svazové akce!

Platnost adresy také dosud potvrdil jen malý počet doživotních členů. I zde Starto nyní dostanou všichni, ale znovu opakovaně žádám každého (i ty, které osobně známe a víme, že se akcí účastní), aby mailem či poštou na adresu našeho pokladníka V.Hirše (viz 2.strana) svou adresu potvrdil. Jinak nepotvrzení aktuální adresy budeme považovat za souhlas, že tištěné Starto nevyžadujete, že vám stačí jeho internetová verze dostupná na www.esperanto.cz a že tímto pomáháte uspořít prostředky ČES.

Předem všem děkuji za pochopení a vstřícnost.

Ing.V.Dvořák
předseda ČES

P.S.


Výzvu výjimečně píšeme v češtině, aby každý člen textu porozuměl.

Jaro de Tibor Sekelj

(1912-1988)


Eŭropa Esperanto-Unio proklamis la jaron 2012 Jaro de Tibor Sekelj, ĉar ni festos la 100-an datrevenon de lia naskiĝo.

La fama verkisto kaj vojaĝanto naskiĝis la 14-an de februaro 1912 en Spišská Sobota (nun urboparto de Poprad), sed baldaŭ la familio translokiĝis al Rumanio kaj en 1922 al Serbio, ĉar la patro kiel bestkuracisto devis serĉi laboron. En 1926 la familio ekloĝis en Montenegro, kie Tibor finis gimnazion. En 1929 li ekstudis en universitato en la kroata Zagrebo kaj en 1933 diplomiĝis. Tiamaniere li fariĝis hungardevena serbokroato kun multlingvaj spertoj. Lia talento ebligis al li lerni 25 lingvojn, el inter ili plej bone la hungaran, serbokroatan, hispanan, germanan, anglan, francan kaj Esperanton.



Tibor Sekelj en 1952

Kiel knabo li estis skolto, poste li fariĝis montgrimpanto kaj faris plurajn esplorvojaĝojn al nekonataj regionoj de Suda kaj Meza Ameriko, Afriko, Aŭstralio kaj Azio. Pri siaj vojaĝoj li sciis bone rakonti en sennombraj prelegoj kaj multaj verkoj, el kiuj li kelkajn verkis rekte en Esperanto, aliaj estis esperantigitaj.



Samtempe li estis fervora esperantisto, verkis lernolibrojn kaj fondis dekon da Esperanto-asocioj kaj kvindek da Esperanto-rondetojn en la regionoj de la tria mondo.

Lia plej populara libro estas **Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo** verkita originale en Esperanto pri 12-jara indiana knabo, kiu savis plenkreskulojn, kies ŝipo dronis sur Amazono. Ekzistas du manuskriptaj tradukoj en la ĉeĥa.

Por ni estas interesa ankaŭ **Tra Lando de Indianoj** verkita hispane kaj esperantigita de Ernesto Sonnenfeld. Ankaŭ tiu ĉi akademiano naskiĝis en nia lando, redaktis Bultenon de EK Brno en la 1930-aj jaroj, sed poste li antaŭ faŝismo fuĝis al Argentino kaj Urugvajo kaj fondis tieajn Esperanto-asociojn.

Aliaj famaj verkoj estas **Tempesto super Akonkagvo**, **Nepalo malfermas la pordon**, **Mondo de travivaĵoj**, **Temuĝin, la filo de la stepo**. La rakonton *Kolektanto de ĉielarkoj* konas ĉiu, kiu lernis laŭ *Paŝoj al plena posedo* de W. Auld.

*Miroslav Malovec
fotoj el Vikipedio*

Mia renkontiĝo kun Tibor Sekejl

Mi partoprenis en Hungario en Gödöllő (antaŭurbo de Budapeŝto) ILEI konferencon en la jaro 1978 aŭ en 1979 (mi ne memoras precize la jaron). Por mi ĝi estis (krom pedagogia programo) tre interesa. Mi loĝis en dulita ĉambro kun profesoro Szerdahely, kiun mi povis pli bone ekkoni persone, li estis tre agrabla homo. La alia eminentulo, kiu partoprenis la konferencon, estis Tibor Sekejl. Unu vesperon rekontiĝis en lia ĉambro grupeto de konferencanoj por babilado kun li kaj mi havis la feliĉon esti en ĉi tiu grupo.

Lia rakontado estis tre interesa, kion certe povas imagi ĉiu, kiu legis iu(j)n el liaj libroj. Kiam li vidis la situacion en Eŭropo antaŭ proksimiĝanta la dua mondmilito, li kolektis kelkajn gemikojn, preparis ekspedicion kaj forveturis el Eŭropo, sed mi ne memoras, pri kiu ekspedicio temis kiel la unua. La plej interesa estis lia rakontado pri lia restado inter indiĝenaj triboj en Brazilo kaj Nov-Gvineo. Por la esploroj li neniam venis kun ekspedicianoj kiel fremdulo, li vivis inter indiĝenoj kiel ano de ilia tribo. Li lernis iliajn lingvojn, submetiĝis al iliaj kutimoj kaj partoprenis ĉiujn ritualojn kaj laboris por vivteni sin kune kun vilaĝanoj. Tiamaniere li povis detale esplori iliajn vivon kaj vivmanierojn.

Kelkfoje li estis en danĝero de vivo. Iam okazis, ke al ŝamano de la tribo tre plaĉis la edzino de Tibor. Sed la geedzoj estis ĉiam kune, do Tibor estis

grava malhelpilo por ke li povu akiri lian edzinon kaj li strebis iamaniere forigi lin. Iam nokte falis palmo sur kabanon, en kiu Tibor dormis. Feliĉe li kuŝis sub apogilo, firma trabo kaj la falinta palmo lin ne mortigis, eĉ ne vundis. Kiam li poste esploris la palmon, li klare vidis, ke la trunko estis intence duonseĝita. Iam la ŝamano invitis lin en sian kabanon kaj regalas lin per tre bongusta trinkaĵo. Estus malĝentile rifuzi inviton aŭ trinkaĵon, ĉar tio estis granda honoro por li.

Kiam Tibor eliris el la kabano, li pripensis, ke en la trinkaĵo verŝajne estis veneno. Li iris al sia kuracisto kaj diris tion al li. La kuracisto donis al Tibor kontraŭvenenan injekton kaj medikamenton por vomi, por ke almenaŭ kiel eble malmulte da veneno restu en lia korpo. Sed tamen iom de veneno restis kaj komencis efiki. Tibor senkonsciiĝis kaj aspektis preskaŭ morta. La sekvan tagon lia korpo tamen venkis la krizon kaj li vekiĝis. Meze de la kabano estis elfosita truo por entombigi lin. Ĉe tiu tribo estis kutimo entombigi mortinton en la kabano, en kiu li vivis. Estis do klare, ke oni jam konsideras lin morta. Li mobilizis siajn fortojn kaj pene iris ĝis la palmo meze de vilaĝo kaj tie falis. Iom post iom li resaniĝis, kio estis granda surprizo por la ŝamano. Ĝis tiam neniu transvivis regalon per lia venena trinkaĵo. Ununura klarigo de tio estis, ke Tibor estas Dio. De tiam li povis havi ĉion, pri kio li nur pripensis kaj povis havi komfortan vivon. Sed li rezignis kaj daŭrigis sian vojaĝon al alia tribo.

Josef Vojáček

NOVAJ EKSPozICIOJ EN ESPERANTO- MUZEO SVITAVY

Ĝis la 15-a de majo vi havas ankoraŭ ŝancon viziti la nunan ekspozicion *Spiritaj tradicioj de la mondo kaj Esperanto*. La ĉi-jara ĉeftemo estas **125 JAROJ DE ESPERANTO** kaj la inaŭguro estas pro amplekseco de la aktualigoj dividita je du partoj. La unua (malpli granda) parto estos solene inaŭgurita **la 14-an de aprilo** kadre de la **REGIONA RENKONTIĜO**.

Ties partoprenantoj kunvenos je la 10-a horo en la trajna stacidomo kaj/aŭ en la muzeo kaj poste kune vizitos nove rekonstruitan sportstadionon kaj post la tagmanĝo ekde la 13:30 povos krom kelkaj novaj ekspoziciaj paneloj kaj vitrinoj ĝui programon omaĝe al ĝuste tiutaga 95-jara datreveno de forpaso de d-ro Zamenhof. Atendos vin dokumenta filmo, prezentoj, kultura programo kaj amuzkvizo, fine ne mankos ankaŭ kutimaj raportoj el la E-rondetoj en Bohemia-moravia limlando.

La ĉefa inaŭguro de la nova ekspozicio okazos denove kadre de la **MUZEA NOKTO la 2-an de junio**. La komenco estas planata denove por la 16-a horo.

Ni pripensas i.a. organizi antaŭ aŭ post tagmanĝo duhoran komputilan seminarion en la loka bazlernejo. Krom bongustaĵoj ni pretigas por vi prelegetojn, filmprojekciadon kaj mu-

zikan programon kaj vi povos viziti ankaŭ buntan programon en la apuda Urba muzeo. Por interesitoj ni klopodos prizorgi favorprezan tranokton en la studenthejmo. Dimanĉe antaŭtagmeze dezirantoj povos ekskursi sub gvido de la loka ĉiĉerono aŭ al la fontoj de la rivero Svitava aŭ al la urbo Polička kaj ties vidindaĵoj, i.a. nove malfermita vizitinda Centro de B. Martinů.

Same kiel dum Vikimanio lige kun la jubileo de Esperanto ni klopodos denove akiri por la Muzea nokto atenton de amaskomunikiloj. Tial ni ĝojos pro abunda partopreno, por ke la publiko vidu, ke Esperanto vivas!

Krome ni invitas vin al **VIRTUALA EKSPozICIO** de la muzeo en Ipernity www.ipernity.com/home/181031, kiu post iom pli ol unu jaro da ekzisto enhavas jam pli ol mil multkomunikilajn dosierojn (do ankaŭ sonregistraĵojn kaj filmetojn), atingis jam ĉ. 30 000 virtualajn vizitojn kaj en sia reto havas pli ol 1800 membrojn el naŭdek landoj.

Se vi volas kontribui al nia nova ekspozicio per iuj interesaj historiaj materialoj (ĉu palpeblaj aŭ ciferecaj kaj sendeblaj retpoŝte) bv. kontakti Pavla Dvořáková,

pavla.esperanto@gmail.com

Koran antaŭdankon por via kunlaboremo!

-padv-



Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK

Temo: Sciencfikcio kaj robotoj

14–20 Julio 2012 en SVITAVY, Ĉeĥio



Prelegos i.a.

Mikaelo Bronŝtejn,
István Nemere,
Liven Dek, ...

Konferencejo:

Esperanto-muzeo
(Ottendorfer-Domo, vidu
la bildon) el 1892

Riĉaj kultura kaj turisma
programoj, kurso de
Esperanto por komencintoj



Pli da informoj kaj aliĝiloj: www.kava-pech.cz/iek aŭ chrdle@kava-pech.cz

Antaŭvidita programo de IEK en Svitavy

de la 14-a ĝis la 20-a de julio 2012

Sabato: alventago, registriĝo, konatiĝo kun la Esperanto-muzeo, interkona vespero kun refreŝiĝo (manĝeto, tosto per vino)

Dimanĉo: atm. Solena malfermo, prelegoj de L. Dvořáková pri Svitavy kaj la regiono Pardubice kaj prezento de la kandidatverkoj por OSIEK-premio 2012, **ptm.** Gvidata promeno tra la urbo kaj la urba muzeo, ekumena diservo, **vesp.** Filmvespero

Lundo: atm. Laŭtemaj prelegoj (P. Chrdle: Robotoj kun la fono de verkaro de K. Čapek, M. Gutiérrez: Sciencfikcia literaturo 1), **ptm.** Seminario pri la temo: „Esperanto-Bibliotekoj“ sub la gvido de Detlev Blanke, **vesp.** Sporto: laŭinterese boŭlo-globludo, skvaŝo, tablotenis

Mardo: atm. Laŭtemaj prelegoj (T. Witkam: Vizito el la jaro 10.000 al nia ideala planedo, I. Nemere: Terra), **ptm.** Ekskurso al Litomišlo, trarigardo, meto de florbukedo al la tombo de Karolo Píč, **vesp.** Kultura programo

Merkredo: atm: Laŭtemaj prelegoj (M. Bronštejn: Sciencfikcio – verkoj de fratoj Strugatzki, M. Maradan: Zorg-Robotoj, kiel alparoli ilin prudente?), **ptm:** Piedekskurso al la fonto de la rivero Svitava (proks. 8 km), **vesp.** Internacia vespero (laŭ propono de la partoprenantoj)

Ĵaŭdo: atm. Laŭtemaj prelegoj (T. Witkam: Robotoj en 2045, ĉu pli inteligentaj ol ni?, M. Gutiérrez: Sciencfikcia literaturo 2), **ptm.** Ekskurso al Moravská Třebová, **vesp.** Teatra vespero (R.U.R.)

Vendredo: atm. Ĝenerala asembleo de OSIEK kaj voĉdonado por la OSIEK-premio, voĉdonado pri la loko kaj temo de la IEK 2014, oficiala fino de la konferenco.

Dum la kongreso estas planata ankaŭ rektmetoda paroliga kurso por komencintoj paralele kun la prelegoj. Ĝi okazos en la studenta hejmo sub la gvido de Stano Marček

* * * * *

Okaze de la konferenco kun la temo pri sciencfikcio kaj robotoj la eldonejo KAVA-PECH preparas eldonon de la dramo de Karel Čapek „R.U.R.“, en kiu unuan fojon estis uzita la termino „robot“ por artefarita homsimila inteligenta estaĵo. La vorto sekve disvastiĝis en preskaŭ ĉiuj lingvoj de la mondo kaj fariĝis eĉ norma teknika termino.

Tiu famkonata sciencfikcia dramo estas envicigita en la serion Oriento-Okcidento de UEA. Ĝi estos je dispono dum la konferenco.

112 paĝoj, solide bindita, traduko: Moraviaj Esperanto-Pioniroj (Olomouc), ilustraĵoj: Miroslava Tomečková



Mezinárodní konference OSIEK

Šance pro naše esperantisty

Mezinárodní konference OSIEKu, která se bude konat ve Svitavách v prostorách muzea esperanta od 14. do 20. července, dává unikátní možnosti všem našim esperantistům.

Jazykově zkušení se mohou seznámit se zajímavým tématem konference „Scifi a roboty“, poslechnout si přednášky a diskutovat s vynikajícími zahraničními esperantisty (István Nemere, Anne Jausions, Michael Bronstein, Toon Witkam, Mélanie Maradan, Miguel Gutiérrez, Detlev kaj Wera Blankeovi, Gerrit Berveling a další)

Kurs esperanta: Ti méně zkušení, ať začátečníci s minimálními znalostmi esperanta, „věční začátečníci“, nebo mírně pokročilí, budou mít možnost se v době přednášek zúčastnit kurzu esperanta vedeného Stano Marčekem, v dnešní době asi nejzkušenějším učitelem esperanta na světě a autorem učebnice „Esperanto přímou metodou“, která už vyšla ve více než 20 jazycích (česky v nakladatelství KAVA-PECH). Kurs se bude konat v Domově mládeže, kde je také možnost levného ubytování.

Přednášky a kurzy budou vždy dopoledne. Odpoledne a večery budou vyplněny bohatým turistickým a kulturním programem pro všechny účastníky (přednášek i kursu esperanta). Jedno odpoledne bude věnováno mimotematickým přednáškám a besedám, mj. o esperantských knihovnách (Detlev Blanke).

Pro členy ČES je konferenční poplatek pouze 250.- Kč (po 30. 4. 2012 pak 350.- Kč). Ubytování bude ve velmi dobře vybavené studentské ubytovně (bez snídaně, ale s možností využití kuchyňky) již od 220.- Kč/noc, pro náročnější pak v tříhvězdičkovém hotelu Garni, včetně snídaně a volného vstupu do plaveckého areálu od 490.- Kč/osobu a noc (v dvoulůžkovém pokoji).

V rámci konference je plánováno i představení R.U.R. v esperantu, koncerty, výlety do Litomyšle a Moravské Třebové, ale i ekumenická bohoslužba v esperantu, pravděpodobně v novém pravoslavném chrámu (pokud bude do té doby dostavěn), kterou povede mj. i farář remonstranské církve, známý spisovatel a překladatel z Nizozemí Gerrit Berveling spolu s duchovními dalších křesťanských církví.

V rámci konference budou účastníci seznámeni s tituly nominovanými na literární cenu OSIEK. Všichni přítomní členové OSIEKu budou mít možnost v závěru hlasovat a spolurozhodnout, komu bude cena udělena, stejně jako o místě konání a tematu konference v roce 2014.

Členství v OSIEKu stojí 250.- Kč/rok a až do konference je možné ho uhradit společně s přihláškou na konferenci.

Nakladatelství KAVA-PECH připravuje při příležitosti konference vydání dramatu Karla Čapka „R.U.R.“ v krásné pevné vazbě, doplněné ilustracemi Miroslavy Tomečkové a krátkým pojednáním o Karlu Čapkovi a vzniku slova „robot“. Toto vydání už UEA zařadil do serie významných knih Orineto-Okcidento.

Rozhovor s Petrem Chrdlem o OSIEKu a o konferenci ve Svitavách na rozhlasové stanici cra.cn (Čína Radio Internacia) si můžete poslechnout na webovém adrese <http://esperanto.cri.cn/bbs.htm> a najdete ho i na stránce www.esperanto.cz v rubrice aktuality.

Bližší informace najdete na webových stránkách www.kava-pech.cz/iek_cesky, nebo u předsedy organizačního výboru konference Petra Chrdleho, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, chrdle@kava-pech.cz.

Plej furoraj libroj de UEA 2001-2011

(nombro de venditaj ekzempleroj)

- | | |
|--|--|
| 3127 Vojaĝo en Esperanto-lando | 331 Esperanto per rekta metodo (Stano Marček) |
| 2960 Pasporta Servo | 330 Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo |
| 1488 Saluton! (Audrey Childs-Mee) | 324 Paŝoj al plena posedo |
| 1231 Gerda malaperis! | 321 La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka |
| 1137 Pocket Esperanto Dictionary | 320 Lasu min paroli plu! (Claude Piron) |
| 1049 Baza Esperanta radikaro | 314 La danĝera lingvo (Ulrich Lins) |
| 855 Konkiza etimologia vortaro | 304 Vere aŭ fantazie (Claude Piron) |
| 777 Plena ilustrita vortaro de Esperanto | 302 Lingvistikaj aspektoj de Esperanto (Wells) |
| 765 Faktoj kaj fantazioj | 298 Maskerado ĉirkaŭ la morto (T. Soros) |
| 761 Poŝamiko | 287 La nigra insulo (Hergé) |
| 713 Mil unuaj vortoj en Esperanto | 272 Plena manlibro de Esperanta gramatiko |
| 643 Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj | 268 La Komuna Eŭropa Referenckadro |
| 638 Praga Manifesto de la movado | 263 Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj |
| 613 Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA | 260 Kunci Esperanto (H. Goes, B. Mulyadi) |
| 569 Lingvo kaj popolo (Humphrey Tonkin) | 259 Eseoj memore al Ivo Lapenna |
| 545 Vivo de Zamenhof (Edmond Privat) | 254 La arto labori kune |
| 515 La Zamenhof-strato | 253 Monumente pri Esperanto |
| 507 Sed homoj kun homoj | 252 Paĉjo, kio estas rasismo? |
| 486 Vastas la mondo, multas laboro | 246 Esperanto de nivelo al nivelo |
| 427 La libro de la mirindaĵoj (Marko Polo) | 236 Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj |
| 425 Esperantaj sinonimoj (Jaan Ojalo) | 235 Unuiĝintaj Nacioj: Venu kun mi! |
| 417 Jubileo (Red. Mark Fettes) | 227 Etimologia vortaro de la propraj nomoj |
| 417 Patrino koro (Nedelka Nedelčeva) | 227 La brusela bubo (W. Vandersteen) |
| 410 Ĉu vi parolas tendare? | 225 La fenomeno Esperanto (William Auld) |
| 402 Sankta Biblio | 224 Kio ni estas kaj kion ni celas |
| 401 Nova Esperanta krestomatia | 221 Nederlands-Esperanto-Nederlands
Woordenboek |
| 394 Winnie-la-Pu | 221 Reeĥoj (Jugoslavia poemaro) |
| 380 Hejma vortaro | 220 Afero de espero (Heidi Goes) |
| 374 Fundamenta krestomatia | 218 La postdomo (István Ertl) |
| 373 Manlibro pri instruado de Esperanto | 217 Originala Esperanta bildvortaro |
| 363 Dictionnaire de poche / Poŝvortaro | 216 La jaro (poŝkalendario) |
| 357 Tinĉjo en Tibeto | 216 Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al la faka literaturo (D. Blanke) |
| 349 Utila Estas Aliĝo | 213 Historio de Esperanto (Korĵenkov) |
| 348 Ĉu nur-angla Eŭropo? | 211 La vivo de Henriko Kvina (Shakespeare) |
| 343 Asteriks kaj la normanoj | 211 Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj |
| 332 Proverbaro esperanta | 210 Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj |
| | 206 La Hobito, aŭ tien kaj reen |
| | 201 Fundamento de Esperanto |

Esperanta libromerkato 2001-2010

Vojaĝo en Esperanto-lando ĉampiono de la jardeko

Vojaĝo en Esperanto-lando de Boris Kolker okupis la unuan lokon en la furorlistoj de la Libroservo de UEA dum pluraj jaroj ekde la apero de ĝia reviziita kaj abunde ilustrita dua eldono en 2002. Ne mirinde, ke kun 3127 ekzempleroj tiu “perfekta kurso de Esperanto kaj gvidlibro pri la Esperanto-kulturo” fariĝis la ĉampiono de la tuta jardeko 2001-2010.

La jaraj furorlistoj de la Libroservo estas longa tradicio en nia revuo. Antaŭ 10 jaroj oni faris la unuan paŝon por komenci ankaŭ tradicion de jardekaj furorlistoj, kiam en la julia-aŭgusta numero 2001 aperis listo de 100 plej multe venditaj libroj kaj 20 ne-libroj en la periodo 1989-2000. La unua periodo estis 12-jara por inkluzivi ankaŭ la unuajn du jarojn ekde la komenco (en 1989) de la komputila administrado de la stokoj kaj vendoj de la Libroservo. Survoje al tradicio, jen la listo pri la unua jardeko de tiu ĉi jarmilo.

Same kiel nun, ankaŭ en la listo de 2001 la unuan lokon gajnis lernolibro, *Saluton!* de Audrey Childs-Mee, de kiu dum 12 jaroj vendiĝis 3 233 ekz. Apero de aliaj lerniloj kaj de retaj kursoj duonigis ĝiajn vendojn (1 488 ekz.), sed ĝia nuna tria loko montras, ke ĝi plu estas ŝatata. Sur la dua loko en 2001 estis la adresaro de *Pasporta Servo* de TEJO, kiu konservis ĝin ankaŭ ĉi-foje (resp. 3 138 kaj 2 960 ekz.).

Lerniloj, legolibroj, vortaroj k.a. prilingvaj libroj tute nature estas la ĉefa

grupo inter la plej furoraj titoloj. La plej vendita beletraĵo, ne verkita kun lingvoinstrua celo, estas la rakontaro *Patrino koro* de N. Nedelĉeva sur la 22-a loko (417 ekz.) – krom se estas fikcia ankaŭ *La libro de la mirindaĵoj* de Marko Polo (20-a kun 427 ekz.). La plej furora ne-prilingva scienca libro estas *La kosmo kaj ni* de D. Galadi-Enríquez kaj A. Wandel (84-a kun 190 ekz.).

Oni atentu, ke temas pri furorlisto de la Libroservo de UEA kaj ne de la tuta Esperanta libromerkato. Por la titoloj eldonitaj de UEA/TEJO (indikataj per *) la nombroj indikas iliajn totalajn vendojn, sed por la titoloj de aliaj eldonejoj nur tiujn vendojn, kiuj okazis tra UEA. La efektivaj vendokvantoj de ĉi-lastaj estas pli grandaj, ĉar iliaj eldonejoj vendis siajn varojn ankaŭ al aliaj libroservoj kaj individuaj klientoj. Tamen, nuntempe verŝajne tuta duono de la Esperanta libromerkato realiĝas tra UEA. Ankaŭ la nombro de UEA-eldonaĵoj en la jardeka listo kreskis: 38 en 2001; ĉi-foje 51.

La mona vendosumo dum 2001-2010 estis € 1 253 530; dum 1991-2000 ĝi estis € 1 222 850. La sumo do kreskis 2,5%, kvankam malkreskis la ĉefa merkato de la Libroservo, la membraro de UEA. La averaĝa jara nombro de individuaj membroj estis 7280 dum 1991-2010 kaj 5860 dum 2001-2010, t.e. falo de 19,5%. Aliflanke, A. Korĵenkov kalkulis en *La Ondo de Esperanto*, ke la averaĝa prezo de novaj libroj plialtiĝis 38% (de € 8,22 al € 11,40). Ke la vendosumo de la Libroservo ne falis, nur parte dankindas al pli altaj prezoj. La ĉefa porcio konsistis el eldonaĵoj de UEA, kies prezoj estas regule reduktataj en postaj jaroj.


Osmo Buller

SEMINARIO EN SKOKOVY KAJ SABLĀ PRINTEMPO ĈI-JARE KOMUNOS!

Ni invitas vin al la jam tradicia Prin-tempa seminario en pensiono ESPERO en Skokovy (apud Žďár u Mnichova Hradiště), kiu okazos inter la 16-a kaj la 22-a de aprilo 2012. Samtempe, ekde la 19-a de aprilo vespere ĝis la 22-a tagmeze samloke okazos ankaŭ programo de la 6-a Sabla Printempo. Do ĉi-foje ne en Písek – ĉeĥlingve Sablo – nek en ĝia ĉirkaŭaĵo, sed en la sabloŝtona regiono de Bohemia Paradizo!

Tial tiuj, kiuj antaŭe spertis dilemon inter la du aranĝoj, povos nun ĝui ambaŭ! Atendas vin ne nur diversgrada lingvoinstruado kaj konversacio, sed ankaŭ ekskursoj al la ĉarma ĉirkaŭaĵo, manlaboroj, promenoj, gimnastikado, vespera kultura programo kaj amuziĝo en agrabla amikeca etoso.

Krome por dezirantoj okazos paralele tri antaŭtagmezaj blokoj de Sabla Printempo: vendrede seminario pri tradukado de turismaj tekstoj, sabate seminario *Esperanto en Interreto* (ankaŭ por komencantoj pri komputilumado) kaj dimanĉe (kaj/aŭ dum alia libera momento) laborseminario pri kreado de voĉregistraĵoj en Esperanto (vi povos aŭ mem lerni, kiel teknike realigi ilin, aŭ nur „pruntedoni“ vian belan voĉon laŭlegante iun interesan instruan aŭ beletran tekston en Esperanto!). La registraĵojn oni poste povos eldoni en formo de KD, aperigi en Interreto aŭ proponi al diversaj radiostacioj en Esperantio. Vespere vi krome povos ĝui ankaŭ projekciadon de mallongaj filmoj (paroligitaj aŭ subtekstigitaj esperante).



Tuttaga KOTIZO ĉ 405,- CZK pagebla surloke kovras tranokton en 2- ĝis 5-lita ĉambro + plenan pension. Ekskursoj aparte pagendas. Kotizo por organizaj kaj programaj elspezoj libervolas laŭ viaj financaj eblecoj kaj bontrovo.

Bv. aliĝi ĉe: Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, 290 01 Mladá Boleslav, tel. 720 652 320,

drahotova@esperanto.cz

Interesiĝantoj pri partopreno en programoj de Sabla Printempo, bv. kontakti Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek pavla.esperanto@gmail.com (laŭ nombro kaj progresinteco de la dezirantoj oni precizigos la konkretan enhavon). Ni antaŭĝojas pri via intereso kaj via alveno! Retejo de la pensiono: <http://home.tiscali.cz/penzionespero/>

Kabla televido pri Esperanto

La 10-an de februaro 2012 Jiří Tomeček prelegis pri Esperanto al skoltaj en Kopřivnice, raporton elsendis loka televido.



BONVENON AL TRILANDA KONFERENCO en BŘECLAV

ekde la 27-a ĝis la 30-a de septembro 2012

Ĉeftemo: Esperanto kiel vojo al ekkono de niaj najbaroj



ĈEA-estraro invitas vin elkore al konferenco, organizata ĉi-foje komune kun Slovacia Esperanto-Federacio kaj Aŭstria Esperanto-Federacio. Ni esperas, ke internacia etoso kontribuos al allogeco de la aranĝo. Ĉar 28.9. estas ŝtata festo en Ĉeĥio, ĉi-foje la renkontiĝo estos je unu tago pli longa kaj tial eblos pretigi pli buntan programon, ne nur laboran kaj distran, sed ankaŭ klerigan.

OKAZLOKO

La elektita urbo Břeclav (distrikta urbo kun ĉ. 25 mil loĝantoj) situas ĝuste surlime inter la tri landoj kaj estas trafike tre bone atingebla el ĉiuj direktoj, ĉu trajne, buse aŭ aŭtomobile. Kvankam en la historio ĝi estis plurfoje grave damaĝita (lastfoje dum bombado en la 2-a mondmilito), temas pri loko turisme interesa. Ĝi estas centro de la folkloro vinregiono Podluží kaj bonŝance ĝuste dum nia konferenco en la urbo okazos Sankt-venceslaa solenaĵo kun popolmetia jarfoiro, multnombraj kulturaj spektakloj kaj vingustumado, kiun ni ankaŭ povos ĝui. Krome en senpera proksimeco de la urbo troviĝas unika Areo Lednice-Valtice, kiu estas parto de la Mondheredaĵo de UNESKO. Kun ĝi ni povos konatiĝi dum la vendreda posttagmeza ekskurso – ni vizitos i.a. romantikan kastelon Lednice kaj ĝian mirindan parkon.



kastelo Lednice



studenthejmo

LOĜADO KAJ MANĜADO

Ne estis facile trovi en la limregiono lokon taŭgan por niaj bezonoj. Studenthejmo de Industria mezlernejo de E. Beneš (adreso: Domov mládeže, Bří Mrštíků 4 – <http://domov.spsbv.cz/>), kie ni grandparte loĝos, fine montriĝis kvankam ne ideala, sed plej akceptebla el realaj eblecoj. Proponatas favorpreza tranoktado en 2- aŭ 3-litaj ĉambroj (kun duŝejoj/necesejoj surkoridore) kaj manĝado en vid-al-vida studenta manĝejo. La programo okazos en la manĝejo kaj 2 klubejoj, ev. kaze de favoraj finan-

caj kondiĉoj en klasĉambroj en la apuda lernejo. La studenthejmo situas 5 minutojn de la ĉefa placo kaj 15 minutojn piede de la busa kaj trajna stacidomoj. Por dezirantoj pri pli komforta loĝado ni havas rezervitajn lokojn en proksima tristela hotelo IMOS (vidu <http://www.hotelimos.cz/>).

SKIZA SUPOZATA PROGRAMO

27.9. posttagmeze	alveturo, konatiĝo kun la urbo, konversacia kurso, eventuale programeroj okaze de „Tago de eŭropaj lingvoj“
vespere	ĉeftema programo (prelegoj, projekciado)
28.9. antaŭtagmeze	ĉeftema programo (prelegoj, diskutoj, prezentoj)
posttagmeze	busekskurso al Areo Lednice - Valtice (vizito de la kastelo Lednice kaj ties parko)
vespere	kultura programo
29.9. antaŭtagmeze	jarkunvenoj de ĈEA, SKEF kaj AEF
posttagmeze	vizito de Sankt-venceslaa solenaĵo en Břeclav (jarfoira kermeso, folkloro muziko, spektakloj)
vespere	amuzvespero
30.9. antaŭtagmeze	ĉeftema programo, diskuto, vizioj pri kunagado

Bunteco kaj allogeco de la ĉeftema programo dependas precipe de iniciatemo kaj aktiveco de la partoprenantoj mem. Proponojn por viaj kontribuajoj bv. direkti al la programestro (vidu sube). Ĉar dume ni disponas sume nur pri ĉ. 100 tranoktlokoj kaj pro la solenaĵo dum nia dato estos nefacile trovi pliajn loĝeblecojn, ni rekomendas ĉi-foje propraintere aliĝi sufiĉe frue! Tial ni aperigas la informon ĉi-jare jam en la 1-a numero de Starto.

Detaligaj informoj sinsekve aperados en www.esperanto.cz en **Kalendaro de aranĝoj**. Fine de aŭgusto ĉiuj aliĝintoj ricevos detalan konfirmilon.

Al via aliĝilo bv. memstare aldoni viajn demandojn, programproponojn, eventuale liston de libroj el Libroservo, kiujn vi volus mendi (laŭ listo en Starto 2011/2).

KONTAKTPERSONOJ

(adresojn kaj telefonnumerojn vi trovas sur la interna kovrilpaĝo de Starto)

kasisto Vratislav Hirš – aliĝoj, pagoj

komitatanino Pavla Dvořáková – programo

prezidanto de ĈEA Vladimír Dvořák – ĉio cetera

Ni antaŭĝojas pri viaj ĝustatempaj abundaj aliĝoj kaj persona renkontiĝo kun vi!

Plenamike ĈEA-estraranoj

Demandaro pri informado al ĈEA-membroj

Mi volas informi vin pri rezultoj de la demandaro enmetita en la pasintan Starton.

Unue permesu al mi danki al ĉiuj, kiuj reagis kaj sendis siajn opiniojn. Pozitiva fakto estas, ke neniuj respondoj estis anonima – do neniuj timis misuzon.

Ĝis 31.1.2012 respondis entute 57 membroj, el inter kiuj pli ol 30 respondoj venis retmesaĝe. La tuta nombro ne estas grandega, sed jam donas ŝancon al iuj konkludoj.

Mi prezentas jenajn:

1. 70% havas kaj aktive uzas sian retadreson, dum 20% tute ne havas ĝin,

2. 60% regule uzas interreton, dum aliaj 20% uzas ĝin porokaze aŭ kun helpo,

3. pli ol 60% kapablas rezigni pri presita formo de Starto, kio iom similas kun nombro de respondoj retmesaĝe aŭ skribe, sed grupoj ne tute kongruis,

4. el inter tiuj, kiuj deziras nepre konservi Starton en presita formo, granda plimulto akceptas pagi pli altan membrokotizon, dum nur 5 rezignus pri iu numero,

5. el inter tiuj, kiuj kapablas rezigni pri presita formo de Starto:

a) neniuj postulis malaltigon de membrokotizo kaj grandprocente tolerus ĝian konservon, kio estas tre pozitiva fakto,

b) granda nombro dezirus ricevadi ĈEA-retkomunikojn kaj pli malpli la sama nombro volas senpagan aliron al elektronika Starto, sed grupoj ne ĉiam kongruas (tamen nur unu respondis, ke li pretas rezigni kaj pri Starto kaj pri retkomunikoj).

Mi komprenas, ke respondi retmesaĝe estas pli facile ol plenigi formularon kaj forsendi letere, kaj do „retmesaĝuloj“ povis iom pli influi la enketon, ĉar „leteruloj“ ne tiom nombris. Tamen starigi retadreson kaj uzi interreton fariĝas pli kaj pli ofta afero ankaŭ inter niaj membroj kaj mi ĝojas pri tio.

Same aprezinda estas fakto, ke la aktivaj membroj komprenas la malfacilan situacion kaj por ricevi Starton ili pretas pagi pli kaj se ili rezignas pri presita formo, ili ne postulas malaltigon de la membrokotizo!

Same klara afero estas, ke ĈEA-retkomunikoj fariĝis grava informilo.


Mi esperas, ke unuaj konkludoj inspiros ankaŭ aliajn esprimi siajn opiniojn kaj ni volonte akceptos ilin ĉe la adresoj de nia kasisto Vratislav Hirš. Nur reciproka informado povas helpi la komitaton trovi iujn konkludojn kaj proponojn, kiujn oni solvos dum septembra konferenco kaj decidus pri sekva vojo.

Sendube Starto estas utila por multaj membroj kaj necesos trakti ankaŭ la enhavon – ĉu la nuna formo taŭgas aŭ kio en ĝi aperu (tute ne temas pri kritiko de la longjara redaktoro!).

Kiel ni promesis, ĉi-jare atendas nin neniuj granda ŝanĝo, sed por venonta jaro la aŭtuna konferenco devas doni klaran signalon kiel pli stabiligi la budĝeton kaj kiujn rimedojn ni uzu.

Mi forte esperas, ke vi utiligos eminentan ŝancon ĝui trilandan konferencon kun pluaj gastoj kaj aliĝos amase al ĝi!

Vladimír Dvořák



Genetike modifitaj nutraĵoj

La mondon timegigas nova fantomo: genetike modifitaj nutraĵoj (GMN). Informoj pri ili estas tre diversaj kaj kontraŭaj, tial ofte aperas demando: „Ĉu ili iĝos enirbileto en la regnon de abundeco, aŭ malbeno de venontaj generacioj?“ La homoj ne konscias, ke temas pri nenio nova, ĉar GMN fakte ekzistas jam plurajn miljarojn. Preskaŭ ĉiuj nutraĵoj, kiujn ni konsumas, estas genetike modifitaj. Preskaŭ ĉiujn fruktojn kaj legomojn al ni liveras kultivataj plantoj, kiaj en la naturo ne vivas, eĉ ne povas vivi, ĉar ili perdis ecojn, kiuj tion ebligas kaj danke al kultivado akiris aliajn postulatajn ecojn.

Tipa ekzemplo estas legoma brasiko (*Brassica oleracea*), kultivata en multaj kultivoformoj, ekzemple kapobrasiko, savoja brasiko, burĝonbrasiko, krispa sabeliko, florbrasiko, brasikrapo (tigo-brasiko), brokolo (italia brasiko) k.a. Ĉiuj estas genetike modifitaj formoj de unu biologia specio. Sed da kultivoformoj de la pomoj estas centoj, simile kiel de multaj aliaj fruktoj, legomoj k.a. En la arbaroj kreskas naturaj fraguoj, frambuoj, rubusarbustoj k. a., sed en la ĝardenoj ni havas genetike modifitajn fraguojn, frambuojn, rubusarbustojn k.a. La greno estas genetike modifitaj pooj* kaj aliaj plantoj, do la faruno kaj ĉiuj farunaĵoj kaj bakaĵoj estas GMN. Genetike modifitaj estas ne nur plantoj liverantaj nutraĵojn, sed ankaŭ aliaj, ekzemple tiel nomataj industriaj plantoj kiel kotonujo, lino, kanabo, tabako k.a.

Ĉiuj bestoj bredataj de homoj, estas genetike modifitaj. Tial krom la viando de ĉasbestoj, ĉiu viando kaj ĉiuj viando-produktoj estas GMN. Same ĉiu lakto

kaj ĉiuj laktoproduktoj. Eĉ la abeloj akiras mielon multprocente el genetike modifitaj plantoj. Escepto estas la arbara mielo.

Organismojn, genetike modifitajn helpe de kultivado kaj bredado, neniu opinias danĝeraj. Nuntempe estas nomataj GMN nur nutraĵoj, kiujn liveras al ni organismoj genetike modifitaj en laboratorioj helpe de gena inĝenierio, kiu ebligas modifadon pli rapidan, pli ampleksan kaj pli precizan. Oni povas certajn ecojn de la organismoj aŭ modifi, aŭ likvidi, aŭ aldoni. Sur la vastaj areoj en Argentino kaj en aliaj regnoj kreskas sojfabujo, kiu estas rezista kontraŭ herbicidoj kaj pesticidoj, kiujn oni devas uzi kontraŭ evitindaj trudorganismoj subpremantaj sojfabujon.

Ankaŭ en Argentino kaj en aliaj regnoj kreskas maizo, kiu estas rezista kontraŭ nocaj organismoj. Tial oni ne devas uzi kontraŭ nocantoj toksajn rimedojn, kiuj ja krom la nocantoj ekstermas ankaŭ multajn utilajn organismojn kaj poluas la vivomedion. Do la gena inĝenierio ankaŭ helpas al ni plibonigi la vivomedion. En Usono, Argentino kaj precipe en Ĉinio kaj Hindio sur vastaj areoj kreskas per gena inĝenierio pliperfektigita kotonujo.

Tamen multaj homoj kaj eĉ tutaj regnoj furioze rifuzas GMN kaj elpensas nekalkuleblajn argumentojn kontraŭ ili. Pro panikaj informoj estas multaj homoj konvinkitaj, ke temas pri toksaj nutraĵoj. En Zambio mortis multego da homoj de malsato, tamen Zambio rifuzis akcepti GMN. Zambia prezidento diris: „Ni preferu malsaton, ol ni manĝu toksajn nutraĵojn.“ Tiel nomataj neracionalaj skeptikuloj diras, ke estas bezona havi malfermitan kapon. Verŝajne ilia kapo estas tiel malfermita, ke el ĝi elfalis la cerbo.

Kriterio de la vero estas praktiko. Loĝantoj de Usono jam tutaj dek jarojn konsumas multegajn GMN kaj multaj tion tute ne scias, ĉar en Usono ekzistas neniam indikoj pri tio, ke temas pri GMN. Produktantoj kaj vendantoj profitas kaj ĉiuj estas kontentaj. Dum ĉiuj dek jaroj aperis neniu negativa efiko de GMN.

Via amata doma hundo de kiu ajn raso, estas nur genetike modifita lupo.

Lubomír Středa

***Rimarko:** poo (*Poa*) - plurjara herbo (ĉeĥe: lipnice)

Esperanto klubo Prostějov

havas en la jaro 2012 entute 31 membrojn. Kunvenoj estas ĉiujŝaŭde je la 17-a horo en klubejo je Hus-placo 91 en Prostějov.



De la 18-a de januaro 2012 komencis aperi en aldonaĵo de merkreda gazeto *Prostějovský deník* kurso de Esperanto, kiu estos publikigita ĉiun duan semajnon.


La 2-an de februaro 2012 okazis jarkunveno de Esperanto klubo Prostějov kun ĉeesto de 10 niaj membroj kaj unu gasto el Olomouc. Dum la jarkunveno nia klubano Bohumil Toman estis nomi-

ta kiel honora membro de nia Esperanto-klubo pro lia multjara aktiveco en nia klubo. Estis elektita nova kluba estraro, kiu laboros en konsisto: prezidanto – Liška Jaroslav, kasisto – Kincl Jiří, bibliotekestro – Smělý Milan, revizoro de kontoj – Kaštilová Bedřiška, estrarano – Smělá Věra. En nia biblioteko estas nun 837 titoloj.

VERSA NEVERSA MOZAIKO

La nova libro de Jan Werner, eldonita proprakoste, prezentas laboraĵojn de la aŭtoro, kiujn li dum multaj jaroj faris por sia plezuro kaj nun retrovis en tirkesto. Ne surprizas liaj eseoj, per kiuj li jam plurfoje akiris premiojn ĉe Belartaj Konkursoj de UEA, ankaŭ liaj tradukoj de beletra prozo jam aperis (ni rememoru la romanon *Fieraj koroj* de Eda Jitzovský, 2010), sed certe vekos miron liaj sep poemoj originalaj kaj 34 tradukoj de ĉeĥaj poetoj (Vrchlický, Mikulášek, Skácel k.a.).

La aŭtoro, konata pro siaj scienc-teknikaj, precipe terminologiaj verkoj, prezentas ĉi tie sian alian intereson kaj amon, beletron prozan kaj poezian. El 116 paĝoj nur tridekon okupas poemoj,



la ceteraj tekstoj, originalaj kaj tradukitaj, estas prozo beletra kaj ne-beletra. Liaj premiitaj eseoj ne mankas, la leganto trovos ankaŭ Komenion, Balabán, Štefánik kaj aliajn personulojn.

-mm-

K filosofickým základům jazykového universalismu

Mirek Čejka

(pokračování)

Zatímco středověké živé jazyky podléhaly proměnám co do místa i času, latina zůstávala poměrně konstantním jazykovým útvarem prestižním. Přesně to formuloval Dante (1265-1321): *Per nobilità, perché lo latino è perpetuo e non corruttibile, e lo volgare è non stabile e corruttibile.* (Pro šlechtu je tedy latina trvalá a neporušitelná, a pro lid je nestabilní a porušitelná.) (*Dante Alighieri: Convivio 1.5.7*)

Velmi výstižně lze pak v těchto dobách národní jazyk charakterizovat jako jazyk mateřský čili *lingua materna*, kdežto latinu spíše jako *lingua paterna* „jazyk otcovský“. Takovým způsobem se totiž dobře postihuje místo tohoto jazyka – latiny – v rámci patriarchálního, muži dominovaného uspořádání společnosti. Byl to jazyk, jemuž se museli učit hlavně chlapi, aby mohli získat postavení v církvi, na universitě a ve státní, popř. dvorské službě.

Je zřejmé, že tato nová, rodící se mnohojazyčná evropská civilizace byla od samého počátku ohrožena fragmentací a rozpadem. Evropané pak přirozeně hledají během svých dějin prostředky, jak se tomuto nebezpečí ubránit, a mezi těmito prostředky zaujímá postupně stále výraznější místo idea jednoho dokonalého jazyka, který by pomohl řešit politické, náboženské a koneckonců i hospodářské nesnáze evropského subkontinentu. Tato idea, že kdysi existoval dokonalý jazyk, který vyjadřoval bez jakýchkoli význačností podstatu všech možných věcí a pojmů, zaměstnávala mysl filoso-

fů, teologů a mystiků; byla to idea, která se vracela ke starozákonním představám knih Mojžíšových. Od starověku až do renesance se nepochybovalo, že jazyk, jímž se mluvilo v zahradě ráje, byl naprosto dokonalý a že tento autentický, původní jazyk může být obnoven a že lidstvo bude schopno skrze něj pochopit pravý smysl bytí. Různé verze této víry přetrvaly až do osmnáctého století a ani dnes není tato myšlenka úplně opuštěna, neboť i dnešní vědci se snaží vytvořit dokonalý přirozený jazyk pro přístroje, které jsou uměle inteligentní.

Mohli bychom toto spleť klubko otázek sledovat třeba po starší židovsko-hebrejské linii různých variant kabbaly nebo po linii hebrejštiny jako matky jazyků, v podstatě bychom se mohli soustředit na stará východiska plynoucí z hlubokých napětí náboženského rázu. To vše necháme dnes stranou. Přeskočíme až do dob renesance, humanismu a osvícenství, do dob, kdy učenci začali s nadšením propracovávat představu apriorního filosofického jazyka, který by vyloučil *idola* (tento termín známe hlavně z díla Francise Bacona *Novum organum*, 1620), tj. falešné, nesprávné myšlenky pocházející z lidské povahy samé, ať už kolektivní, nebo individuální, nebo z filosofických dogmat předávaných tradicí, nebo dále – a to nás zajímá nejvíce – ze způsobu, jak užíváme jazyka samého (*idola fori*). Tyto způsoby nedokonalého užívání jazyka byly určeny potřebami prostých lidí, čímž byly porušeny racionální postupy myšlení, a *idola*, které nám běžný obecný jazyk vnucuje, jsou buďto jména pro neexistující věci, nebo zmatená, špatně definovaná a neúplná jména pro věci existující.

Podle Francise Bacona (1561-1626) je zapotřebí lingvistické terapie, aby se člověk naučil mluvit správně, dokonale vědecky. Problém viděl v tom, jak formulovat abecedu základních pojmů, jak vytvořit jakýsi strukturovaný rejstřík veškerého lidského vědění.

Idola ve svém důsledku způsobují zatemnění mysli lidí a vzdalují je od pokroku vědy.

Není náhoda, že oživený zájem o nový a univerzální jazyk vzešel většinou z Británie. Šlo při tom o víc než jen o odraz anglické expanze v tomto období; byla zde i specificky náboženská stránka věci. Ačkoli byla latina stále ještě společným jazykem učenců, pro anglického ducha byla asociativně spojena s katolickou církví. A kromě toho byla pro anglické mluvčí příliš těžká. Charles Hoole (1610-1667, *překladatel Komenského do angličtiny*) si stěžoval na „častý sarkasmus cizinců, kteří si tropí smích, když vidí u Angličanů (jinak docela dobrých vzdělanců) takovou neschopnost mluvit latinsky“. (*Umberto Eco: Hledání dokonalého jazyka*)

Není zde od místa připomenout slova polského filosofa Leszka Kołakowského (1927-2009) z r. 2000 o místě latiny v evropské civilizaci:

Televizní kanály, které opřádají celý svět, tytéž McDonaldy v Tokiu, v Timbaktu i v Omsku, Papuánci s plechovkami coca-coly – to jsou nepochybné jevy civilizační expanze Západu. Samy o sobě nejsou ani tak příliš nebezpečné, ztrácí se však ona kouzelná různorodost světa. Mám takovou zásadu, že na mezinárodních shromážděních, kde je dovoleno užívat jiných jazyků než angličtiny, mluvím v jiných jazycích. Dominance latiny taky nebyla dobrá a nakonec díky

emancipaci národních jazyků jsme se dočkali moderní literatury. Latina však byla příznakem naší evropské totožnosti, angličtina ovšem takovým příznakem není. (*Leszek Kołakowski o barbarství*)

Ve svém usilování o společný jazyk měli Angličané důvody obchodní (opavdu si mysleli, že univerzální jazyk jim usnadní výměnu zboží na frankfurtském trhu) i důvody pedagogické, neboť anglický pravopis byl v sedmnáctém století daleko nepravidelnější než dnes. Byla to i doba, kdy se dělaly první pokusy naučit mluvit hluchoněmé, a Dalgarno v tomto směru i hodně experimentoval.

Cave Beck (1623-1706, *vytvořil numerický univerzální jazyk*) napsal, že vynález univerzálního jazyka by byl pro lidstvo výhodou, protože by podnítil obchod a ušetřil by mu také výlohy za najímání tlumočnicků. Dodal ovšem také, že by sloužil i šíření Evangelia, zdá se však zřejmé, že evangelizace byla pro něj jen dalším aspektem evropské expanze do nově objevených zemí. Byl přímo posedlý, stejně jako ostatní jazykoví teoretikové jeho doby, výklady o jazyce gest, s jehož pomocí vedli cestovatelé své první rozhovory s obyvateli oněch vzdálených břehů. Ve zprávě o svých výzkumech v Novém Světě r. 1527 si Alvaro Nuñez Cabeza de Vaca (1490-1558) stěžoval na potíže, které měl, když se chtěl domluvit s domorodci mluvícími tisíci různých dialektů, a popisoval, jak cestovatelům vydatně napomáhal jazyk gest, k němuž se museli uchýlovat. Beckovo dílo obsahuje frontispice, na němž se ukazuje, jak Evropan předává Beckův projekt Hindustánci, Afričanovi a americkému Indiánovi, který sám se vyjadřuje gestem ruky. (*pokrač.*)

Plej necese estas koni la ĝustan tempon agi

Estante komercisto, pri reklamado mi ja scias, sed pri reklamado de Esperanto mi bezonis investi tempon kaj monon. Mia unua sperto estis en 2002 en Danio kaj sekvis Belgio, Francio, Germanio, Italio, ktp; entute 13 landoj. Ĉiam, ion novan mi lernis survoje: pli altiras konkretaĵoj, necesas laboro de grafikisto kaj reklamisto, taŭgas mallongaj tekstoj, ktp. Mia celo estas vekti la amas-komunikilojn, ĉar sen ili ni ne povas esperi pri la fina venko. Konsekvenco de tio estos la konkero de la popolo, kiu siaflanke influos la politikistojn.

Post 9-foja reklamado en *Le Monde*, en junio 2010 mi negocis la aperigon de novaĵo pri lingva malegaleco. Tamen ilia reprezentanto, s-ro Meixner, diris, ke intereso ne estis. Mi, do, planis prelegvojaĝon al 9 francaj urboj por varbi reagantojn al la Z-taga tutpaĝa anonco.

Post prelego en Parizo mi veturis al Vannes, kie mi subite malsaniĝis. Mi telefonis al mia edzino: «Mi revenos, ĉar mi ne povas spiri». Ŝi respondis: Esperanto-Movado estas pli grava ol via vivo, do daŭrigu. Sed mi ne povis teni min kaj kiam mi alvenis Osakon, ne povis moviĝi.

La publiko serioze kaj sincere aŭskultis. Post apero de la reklamo, mi ricevis centon da leterkopioj al *Le Monde*; verŝajne ĝi ricevis pluroble pli ol mi. Al la publika intereso, ilia respondo estis ignorado. Mi sentis, ke mi staras antaŭ giganta kaj fortika muro pro desupra premordo kaj ke ili estis



monavidaj... sed ‘dissaltos la obstinaj baroj per la sankta amo disbatitaj’.

Kio estas la rezultoj de la agado en ĉi tiu jardeko? Inter la negativaĵoj menciendas, ke en la komenco la reklamado ne sufiĉe profesiis: ne persvada enhavo, tro da tekstoj, ne konkretaj informoj, ne taŭga aspektigo. Plie, mi nur unufoje reklamis en 1 lando... ja ripetado estas esenca.

Kiam aperis la anonco en Rzeczpospolita en 2004, okazis lunĉodebato en Varsovio kun la litovaj kaj polaj EU-parlamentanoj. Tiam Bronisław Geremek, EU-vicprezidanto kaj eksa ministro pri eksterlandaj aferoj en Pollando, rifuzis ĉeesti kaj private renkonti min, ĉar li konvinkiĝis, ke Esperanto ne povus venki. Tamen en majo 2008 mi sukcesis tuŝi lian koron per anonco en ‘*Le Monde*’. Tiam EU rifuzis utiligi la polan en sia retejo kaj post kunveno kun Seán Ó Riain kaj Jozef Reinart li kunorganizis la debaton ‘Esperanto, ĉu amiko aŭ malamiko de multlingvismo?’ por ĉiuj parlamentanoj la 14-an de julio. Tragike li mortis aŭt-akcidente survoje al Bruselo. Li estis konvinkita, ke plejparto el la EU-parlamentanoj kontraŭas la anglan dominadon kaj ke estas antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto kaj granda manko de scioj. De liaj observoj ni profitu!

La anoncoj vekis homojn kiel Isabel Castro, direktoro de Eurimages aŭ la urbestron de St-Aignan de Grand Lieu, kiuj montris intereson pri la lingvo kaj la Movado. Post aperigo en *La Repubblica* en 2003, 8 italaj parlamentanoj promesis al Itala E-Federacio proponi la utiligon

de E-o en la Eŭropa Komisiono. Unu el ili, Emerenzio Barbieri, dum la nuna parlamenta mandato prezentis leĝpropo- non pri nia lingvo.

Ĉu ankoraŭ menci, ke la hejmpaĝoj de la landaj asocioj en la anonclandoj estis pli vizitataj sekve de la reklamoj? Aŭ ke pliaj lernantoj aperis en la kursoj? La slovaka diplomato Josef Reinvart sendis kopiojn de la anonco en SME en 2004 al ĉiuj slovakaj ambasadejoj tra la mondo kaj oficistoj de la ministerio pri ekster- landaj aferoj.

Ĉu reklami estas vana elspezo? Certe ne, sed investo en la estonteco, ĉar se EU agnoskos Esperanton, la mondo tuj sekvos.

Esperanto estas varo same kiel Coca-Cola, McDonald's, ktp. Se ni ripete montras la solvon al la nuna lingva malegaleco, ni havos la ŝancon sukcesi, ekzemple per samtaga reklamado dum unu jaro ĉiumonate en la 27 EU-landoj. Nun oni simple cedas antaŭ la ĝeneraliĝo de la angla. Nia misio estas vekti la homaron el tiom vasta soporo, imitante Ludovikon. Mi pensas, ke tia sen precedenca agado povus utili kiel brulŝnuro. Ni ne perdos ĉion. Certe io sekvos. Ni bezonas investi por sukcesi. Ĉiu organizo kaj kompanio progresas aŭ regresas. Ne ekzistas horizontala flugo.

Ĉi kampanjo okazu kadre de pli vasta strategio, kio inkluzivu ekzemple, ke LA konigu la reklamojn al siaj landaj kaj EU-parlamentanoj, varbadon de kursanoj aŭ aliajn agadojn laŭ la landaj kondiĉoj. Ankaŭ tio altiros la amaskomunikilojn kaj Esperantujo vigliĝos.

Mia unua reklamo kostis pli ol EUR 70.000 kaj la prezo trioniĝis kondiĉe al 10-foja ripeto. La nuna UEA-havaĵo

larĝe sufiĉas por tio. Kion la Esperan- tistaro opinias?

Mi dankas al Seán Ó Riain, Renato Corsetti, la estroj de Landaj Asocioj kaj tradukistoj pro la valora kaj sindona apogo dum nia febra kontaktado.

Majstro Hidemaru Deguĉi, kiu sugestis en 1923 adopti Esperanton al Majstro Onisaburo Deguĉi, diris: Homoj ĝenerale alkroĉitaj al la nuno, forgesas la pasintecon kaj ignoras la estontecon. Ni, do, kuraĝe agadu por ke 'la nepoj nin benu'.

Etsuo Miyoshi

KIEL ESTUS EŬROPO HODIAŬ, SE NE EKZISTUS EŬROPA UNIO ?

Trieste, 9 – 11 majo 2012

Tiu ĉi konferenco alcelas precipe junu- laron, ĵurnalistaron, scienculojn, politi- kistojn kaj ne-registarajn organizojn. La temo devus kuraĝigi la partoprenontojn prikonsideri Eŭropon laŭ tuteŭropa, transnacia vidpunkto, kaj prezenti niajn komunajn eŭropajn historion kaj poli- tikon en komprenebla maniero por ĉiu ajn. Krome la partoprenontoj devus laŭiri novajn vojojn favorantajn la kunlaboron inter ĵurnalistoj kaj sektoroj de la civila socio, cele al akiro de pli forta konsciiĝo pri la komuna eŭropa identeco. Tutcerte venos la Nobel-premiito pri Ekonomiko prof. Reinhard Selten, prof. François Grin kaj prof. Thomas Jansen, iama Ĝenerala Sekretario de la Eŭropa Popola Partio. Pliajn informojn (aliĝilo, tra- noktejoj ks) oni ricevas skribante al noredv@teletu.it aŭ poŝte: Triesta Esperanto-Asocio – Via del Coroneo 15 – IT-34133 Trieste - Italio.

Václav Havel

(1936-2011)

La 18-an de decembro 2011 forpasis ĉeĥa ŝtata eksprezidento Václav Havel, konata verkisto. En dramo Memorando (Vyrozumění) li elpensis artefaritan lingvon „ptydepe“ kiel satiron al burokrata lingvaĵo de diktatoreca reĝimo, kion kelkaj komprenis kiel rifuzon de ĉiuj artefaritaj lingvoj inkluzive de Esperanto.



Foto kaptis viziton de Václav Havel ĉe Esperanto-stando de Eŭropa Esperanto-Unio dum Ekonomia Forumo en Krynica 2007, kio pruvas, ke lia rilato al nia lingvo ne estis malamika. Li ne nur aŭspiciis la 81-an UK en Prago 1996, sed ankaŭ permesis traduki kaj ludi lian teatraĵon Aŭdienco. Lia avo patrinflanka Hugo Vavrečka, kiu sub pseŭdonomo Hugo Vavris eldonis en 1908 satiron *Leliček en servo de Sherlock Holmes* (filmita kun Vlasta Burian), estis dua ĉeĥa aŭtoro post Jakub Arbes esperantigita (sub titolo *Sherlock Holmes en servo de la hispana trono*).

Kondolencojn al la familio Havel sendis UEA, ĈEA kaj ĈEJ.

-mm-

Lasta flugo de Petr Ginz

Petro Ginz (1928-1944) estis ĉeĥa juda knabo, pereinta dum holokaŭsto, filo de esperantistoj Ota kaj Maria Ginz, kuzo de aktoro Ota Sklenčka. Lia desegno de Luno flugis en la kosmon en spacnavedo Columbia, kiu frakasiĝis dum reveno. Petro Ginz tuj famiĝis kaj fariĝis simbolo de holokaŭsto simile kiel Anne Frank.

Por instrui lernejanon pri holokaŭsto Unuiĝintaj Nacioj preparis novan filmon pri Petro Ginz (www.petrginz.com/) kaj mallongan broŝuron en la angla lingvo (http://www.un.org/en/holocaustremembrance/2012/UN_Petr_Study-Guide.pdf), tradukotan ankaŭ en la araban, ĉinan, francan, hispanan kaj rusan (oficialaj lingvoj de UNO). Alilingvaj ŝtatoj verŝajne devos mem prizorgi tradukon por konigi al siaj infanoj la vivon de la admirinda knabo, kiu jam en sia 12-jaro verkis romanojn kaj bele desegnis.

Ĉestmír Vidman

La naŭdekjara poeto pro sia sanstato ne povis partopreni en nia asocia kongreso en Šumperk, tamen la diplomo de honora membro de ĈEA lin ĝojigis.



Mortis Eli Urbanová

(1922-2012)

La 20-an de januaro 2012 forpasis Eli Urbanová en Armea Hospitalo en Prago, fama esperantlingva poetino, honora membrino de UEA kaj ĈEA, eksa akademiano.

Ŝi naskiĝis la 8-an de februaro 1922 en ĉeĥa urbo Čáslav kiel Eliška Vrzáková. Ŝi studis en pedagogia instituto kaj post abiturientiĝo en 1941 ŝi instruis muzikon en privata lernejo de Štefo Urban (pianon, violon, violonĉelon). En 1942 ili geedziĝis, en 1955 divorcis kaj Eli transiris al popollernejo. En 1965 ŝi fariĝis edukistino de junularo. En 1975 ŝi eldonis ĉeĥlingvan pedagogian helpilon por edukistinoj.

En 1940 librovendisto Malý en Čáslav eldonis ŝian ĉeĥlingvan poemaron *Zrcadlo* (Spegulo) sub pseŭdonomo Eliška Doubravská. Ĝi estis ŝia unua poezia provo.

En 1942 Eli kaj Štefo akompanis muzike aktoron Karel Höger, kiu informis ilin pri Esperanto, ĉar li antaŭ la milito aktoris en Verda Stacio de Brno. Sed nur en 1948 ili ambaŭ esperantistiĝis, en 1949 aliĝis al EK Praha kaj 1950 ekzameniĝis pri lingvo-scio. Tiam ili komencis verki esperantlingve.

Inter la jaroj 1952-1977 Eli Urbanová estis 10-foje premiita en diversaj belartaj konkursoj.

En 1956 Julio Baghy vizitis Pragon, ili interkonatiĝis kaj rezulto estis poemaro **Nur tri kolorojn** (1960) eldonita de Stafeto kun antaŭparolo de Baghy.

En 1969 ŝi instruis Esperanton en Barlastono kaj gvidis kurson por komencantoj en la gazeto *Pionýrská štafeta* (Pionira stafeto, gazeto por geknaboj).



Sekvis poemaroj **El subaj fontoj** (ĈEA, 1981), **Verso kaj larmo** (Iltis, 1986), **Vino, viroj kaj kanto** (Fonto, 1995), **Peza vino / Těžké víno** (KAVA-PECH, 1996, enĉeĥigis Josef Rumler), **El mia buduaro** (Fonto, 2001), **Rapide pasis la temp'** (KAVA-PECH, 2003) kaj **Prefere ne tro rigardi retro** (KAVA-PECH, 2007). Ŝia sola romano **Hetajro dancas** (Fonto, 1995) estas aŭtobiografia kaj ricevis premion OSIEK en 2001.

En 2003 okazis en Prago Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK **Intimaj temoj en Esperanto-beletro** inspirita de ŝia verkaro kaj ankaŭ parte dediĉita al ŝiaj vivo kaj beletro. Aperis prelegaro samnoma (KAVA-PECH, 2005) kun ŝia detala biografio.

En la jaroj 1986-1995 ŝi estis membrino de Akademio de Esperanto. En 1990 ŝin akceptis ankaŭ ĉeĥa verkista asocio *Obec spisovatelů*. Honoran membrecon de ĈEA ŝi ricevis en 1982, de UEA en 1996.

-mm-

KALENDARO

Kalendaro 2012

- 2012-04-14** Regiona renkontiĝo en Svitavy,
Info: dvor.libuse@seznam.cz
- 2012-04-16/22** Printempa Seminario en Skokovy.
Info: drahotova@esperanto.cz
- 2012-04-19/22** La 6-a Sabla Printempo en Skokovy.
Info: pavla.esperanto@gmail.com
- 2012-05-19** Infana tago en Svitavy,
dvor.libuse@sezna.cz
- 2012-06-02/03** Muzea nokto en Svitavy
Info: dvor.libuse@sezna.cz
- 2012-06-01/03** IKUE-renkontiĝo en Žirovnice
Info: svacek@seznam.cz
- 2012-06-21/24** Turisma renkontiĝo en Žirovnice
Info: esperantoplzen@centrum.cz
- 2012-07-10/15:** La 18-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Opava kun la ĉeftemo „Depresio kiel kromefiko de kronikaj malsanoj“.
Info: Eva.Kopečna@ivax-cz.com
- 2012-07-01—2012-08-10** Tri etapoj de SET Lančov,
Info: info@set-lancov.cz
- 2012-07-14/20:** Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy. Tutsemajna aranĝo kun la temo „Sciencfikcio kaj robotoj“ kaj ĝia turisma antaŭprogramo en Prago 2012-07-08/14.
Info: www.kava-pech.cz/iek aŭ chrdle@kava-pech.cz
- 2012-09-13-16:** La 6-a kongreso de AEH-IKEH (handikapitaj esperantistoj) en ripozdomo Štíří důl u Krucemburku (Skorpia valo ĉe Krucenburk).
Info: aeih-ikeh@volny.cz
- 2012-09-27/30:** Trilanda konferenco - Komuna konferenco de aŭstraj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj.
Info: www.esperanto.cz aŭ komitato@esperanto.cz
- Detalojn bv. sekvi en www.esperanto.cz en Kalendaro de aranĝoj!



Milan Neuvirth

29. 3. 1932 - 13. 1.
2012

Post nelonga grava malsano forlasis nin amiko kaj eminenta esperant-

isto Milan Neuvirth. Al Esperanto li dediĉis sin de la junaĝo. Li apartenis al kerno de Junularo Ostrava, kiu poste iniciatis viglan junularan movadon en la kvindekaj jaroj, kiam EA ĈSR malaperis kaj la movado en nia lando frakasiĝis kaj restis sen gvida centro. En ĝi li aktive laboris kaj partoprenis ankaŭ en internaciaj aranĝoj. Li estis aktiva kunorganizanto de Somera Esperanto Lernejo en Rožnov p. Radhoštěm kaj ankaŭ SET en Žimrovice. Krom Esperanto li interesiĝis pri muziko, pentroarto kaj skulptoarto. Kiam li soldatservis en Brno, li vizitadis la lokan klubon. Li partoprenis ankaŭ plurajn UK-ojn, estis prezidanto de EK Ostrava-Poruba, engaĝis sin ĉe plantado de Esperanto-arbo antaŭ gimnazio Olga Havlová. Post nuligo de la rondeto en Poruba li transiris al EK Ostrava-Vítkovice, kie li instruis, aranĝis kunvenojn, muzikis per blovharmoniko, akordeono aŭ mandolino, bonege kantis. Dum Kristnaskaj festoj 2011 lin atakis cerba apopleksio. Merkrede la 11-an de januaro lia filino aŭte transportis lin al la klubejo, kie li disdonis donacojn, kaj vendrede dum dormo li mortis.

Enrico Dondi (1935-2011)

La 9-an de novembro 2011 forpasis E. Dondi, tradukinto de **Dia Komedio** kaj **Vivo Nova** de Dante kaj **Jerusalemo Liberigita** de Tasso.

Vida Jerman (1939-2011)

Fama kroata aktorino, deklaminta ĉe UK-oj, forpasis la 10-an de decembro 2011. Ŝi grave kontribuis al esperantlingva teatro, rolis ankaŭ en pli ol sesdek filmoj, eĉ en la hollywooda *La elekto de Sophie* (kiel SS-gardistino).

Jak platit svazu

Pozor, změna účtu!

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010, variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vratislava Hirše (vhirsx@email.cz) seznam, za koho platíte.

Seznam čísel (ukončení variabilního symbolu):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

Upozornění

pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, polnicky@quick.cz. Předplatné uhradte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

POZOR: změna PŘEDPLATNÉHO!

Monato: 1020,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 610,-Kč
La Gazeto: 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 520,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 310,- Kč.

Juna Amiko: 280,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1130,- Kč (*750,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

Heroldo de Esperanto: 1210,- Kč (*810,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3

Femina: 750,- Kč (*500,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

Periodikum **Českého esperantského svazu - 43. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov
117, 683 04 Drnovice, 517 332 339,
vhirsx@email.cz**

Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2012

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -
- 43-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj, ekster Eŭropo
13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

Ĉeĥio, malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
7.5.2012**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

Konciza psiĥiatria vortaro

estas nova verko de Max Kaŝparŭ en Esperanto. Terminoj kun difinoj, ekz.

ZOOFOBIO

nenormala timo de bestoj

Petu ĉe MUDr. ThDr. Mgr. Max Kaŝparŭ,
393 01 Pelhřimov, Palackého 70, tel. 565
32 12 32, max.esperanto@gmail.com

Google esperantigas

La tradukilo de Guglo en februaro 2012 envicigis Esperanton al lingvoj, inter kiuj ĝi povas peri tradukojn.

MIGRA EKSPozICIO

"Ĉu Esperanto estas morta lingvo?" estos du monatojn vizitebla en Liberec: ekde 3.3. ĝis 29.3. en Regiona scienca biblioteko kaj en aprilo en la urba filio en Vratislavice nad Nisou. En junio ĝi gastos en Urba biblioteko en Doksy (kies direktorino estas bonega esperantistino Renata Mauserová). Pri la monato majo sekvu aktualaĵojn en www.esperanto.cz. Pluaj okazlokoj estos sciigitaj en la sekva numero.